AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

7-a jaro SEPTEMBRO 1952 n-ro 9

LA SOCIALISTA JUNULARO - POR ESPERANTO !

Vidante en IUSY-Tendaro, la nunjara internacia socialista junulara renkonto en Vieno-Hörndlwald, bonan okazon por atentigi vastan publikon pri Esperanto, la Socialista Esperantistaro Aústria decidis rilati kun ties estraro. Ni akiris konsenton pri partopreno kaj tuj komencis la laboron. La financan problemon ni solvis per sukcesa libro-varbvendado de TRAMONDO-eldonejo, per vendado de "brikoj" fare de la E-socialista varbgrupo "Amikeco" kaj per subvencio, disponigita per la socialista landorganizo Vieno. Por la varbado ni luis specialan, modernan tendon.

Tri kunvenoj de la kunlaborantoj suficis por preparri la aferon. Oni distribuis la dejoron en la tendaro. Ĉiu respondecis pri difinita tasko. Por la noktrestado ni disponis pri tendo, pruntita de la naturamikoj.

Sur fronto de 6 metroj staris niaj tendoj . Interili levis sin 4 m alta masto kun la standaro de la laboristaj E-istoj . Anonctabulo 2 x 2 metra portis landkarton de Eúropo. "Esperanto en Eúropo" estis ĝia titolo kaj ĝi montris l organizojn, universitatajn lektoratojn, radiostaciojn, filmproduktejojn, poŝtmark-eldonejn kaj gazetojn de la E-movado. Super tiu tabulego pompis la nova insigno de la soc. E-istoj, la tri sagoj kun la E-stelo en ruĝa ringo. Apude estis lokita afiŝo, donanta superrigardon pri E. en la mondo. Ĝi kaj aliaj pentrolaboroj estis la verkoj de k-dino Gaugitsch kaj k-do

Schober . Grandega verda stelo sur tabulego, montranta per siaj pintoj al la kvin kontinentoj, kun grandforma = ta surskribo "Esperanto" tuj karakterizis nian standon. Afiŝo , desegnita de k-dino Eichinger , entenis eldirojn. de famaj eminentuloj pri E. Vitrino, pruntita de la In = ternacia E-Muzeo , ebligis la prezentadon de gravaj E-libroj el la muzeo kaj de SAT - Parizo, de E-prospektoj, E-ŝlosiloj kaj E-poŝtmarkoj diverslandaj, de la "Dekla= racio pri Homrajtoj", de specimenoj de la E-ista gazet = aro, de korespondaĵoj ktp.

Antaŭ la tendo , ornamita per girlando el flagoj (Ruĝa Kruco, Socialismo, UNO, olimpiaj Ludoj kaj Esper = anto; de la landoj de la Soc. Internacio kaj de la cete= raj demokrataj landoj) oni povis aĉeti E-lernilojn kaj vortarojn. Speciale oni demandis pro ŝlosiloj.

Ĉu vi volas akceli la aŭstrian E-movadon ?
Se j e s , <u>aĉetu ĉiujn paperaĵojn kaj skribartiklojn</u>
por vi kaj viaj infanoj <u>en la Esperanto-Centro</u> !

Nia tendo altiris multegon da vizitantoj, ankaŭ ek= sterlandajn E-istojn. Unue venis franco, poste norvegino kaj svedoj, hispanoj, germanoj kaj nederlandanoj.

Ni distribuis 13.000 varbfoliojn, kiuj en kvin ling= voj vokis al la junsocialistoj: "Ĉu ni komprenu nin ĉiam nur per la manoj, aŭ ĉu ni deziras vivantan Internacion? Do, ni ĉiuj lernu ĝis la venonta renkonto la mondhelp= ling-von Esperanto!"

Ripete nia E-fronto estis fotografata kaj eĉ de francaj ĵurnalistoj filmata. Finnaj ĵurnalistoj kaj niaj svedaj E-istoj intencis raporti pri la E-tendo. Niaj ek= spoziciaĵoj katenis la intereson de la internacia publi= ko. Inter aliaj diversnacianoj ankaŭ japanoj, negroj, urugvajanoj grupe aŭskultis niajn eksplikadojn pri nia lingvo. Sed ankaŭ la pintoj de la socialista movado kaj urbaj aŭtoritatoj sin interesis pri nia afero . Kamarado J o n a s , urbestro de Vieno, kaj lia edzino longe res= tis ĉe ni. La urbestro fervore foliumis en la siatempa organo "La Socialisto" kaj elfosis malnovajn memorojn

el sia redaktora agado. Mallonga interparolo kun k-do O l l e n h a u e r , dua prezidanto de SPD,evidentigis, ke la germana partiestraro simpatias kun E. kaj estas preta, subteni ĝin en siaj vicoj. Dum la oftaj diskutoj ni povis konstati fortan E-emon inter la junsocialistoj. La plimulte de la gvidantaj k-doj de IUSY ja fakte an = koraú subtenas la lingvon anglan, sed tute ne malfavor = is nian propagandon. Ni eĉ havis la permeson , uzi plur= foje dum la tago la megafoninstalon por disaúdigi niajn komunikojn internacilingve.

Krom diskutoj estis ankaú aliaj ĝojigaj okazaĵoj. La Germana E-Asocio salutis nin per telegramo : "Al la soc. E-istoj de la internacia junula tendaro GEA sendas korajn salutojn!". La svedaj geamikoj, por danki pri niaj sukcesaj servoj, donacis al ni arte produktitan arĝentan ornaman subtason. Ĝi estis al ni transdonata en la nomo de 85 svedoj de la gvidanto de la sveda kolono, k-do Ek= mark . Tiu bonega E-isto rakontis al nia redaktoro pri la bonaj servoj , kiujn dum la longa vojaĝo al Vieno E. faris al li kaj liaj samnacianoj. Demandite pri ilia fartado ĉi tie, li nur respondis lakonike: "Mankas al ni nenio."

Dum kunveno de la E-istoj el la diversaj landoj oni interkonsilis sin pri pluaj taskoj kaj oni aprobis dek= laracion, kiu estis subskribita de po unu reprezentanto el sep landoj kaj estos transdonata kaj al la Soc. In= ternacio kaj al la Internacia Unio de la Soc. Junularo. Per ĝi la mondskalaj tegmentorganizoj estis insiste pet= ataj, direkti sian atenton al la ideo de Esperanto.

Por la formado de E-junulaj grupoj en Aústrio kaj Germanio estis kolektata aro da anoncoj. La junsocial= istoj diverslandaj konstantigos kontakton por prepari komune la partoprenon al la proksimjara IUSY-Tendaro sur plilarĝa, internacia bazo per tutaj E-grupoj.

Nia klopodado estis rekompencata per bona sukceso. Mi do en la nomo de SEA dankas al ĉiuj nomitaj kaj ne nomitaj kunlaborintoj.

Peter Haberl
komisiito por la E-varbado en
IUSY-Tendaro Hörndlwald.

(Kompiltraduko de la redakcio.)

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

Klagenfurt. Loka organiza komitato por la Aústria Esperanto-Kongreso 1953 kaj Internacia Esperantista Renkonto en Klagenfurt ekfunkciis. Prezidanto : s-ano ĉefoficisto Leonhard S c h m i d ; sekretario-kasisto : s-ano Karl D ü r r s c h m i d ; komitatano: s-ano urboficisto Otto M ü l l e r .

Filmstrio (normalfilma) pri Novzelando kun teksto estas pruntebla en la E-Centro.

La enketo de la Internacia Komisiono "E. kaj Sociologio", kiun ni aperigis en AER 5-6/52 , estis respondata ĝis nun nur de kelkaj ges-anoj . Estas honorafero de ĉiu serioza E-isto, nun urĝe sendi la respondon !

MALSUPRA-AÚSTRIA ESPERANTO-TAGO

La AEF-landestraro por Malsupra Aústrio (estro s-ano Johann Schwarz, Felixdorf, Bräunlichgasse 12) kaj la estraro de la E-Rondo Hohenberg (estro s-ano Fr. Lampl, Furthof 55) aranĝas dimanĉe, la 5an de oktobro en Hohenberg la ĉijaran E-Tagon de la malsupra-austriaj E-istoj kaj invitas la ges-anojn al certa kaj multnombra partopreno. A n o n c u v i n senprokraste ĉe s-ano Lampl! La Vienaj E-istoj veturos de la Viena Okcidenta Stacidomo dimanĉe (5.10) per la matena trajno je 6.45 h.

La internaciaj kongresoj de neesperantistoj, kiuj okazas sur austria teritorio , estu ekde nun la celodenia varbado ! UEA - Fako Informado-Kongresoj - Juraj Afe = roj (Fakestro: prof. d-ro Ivo Lapenna) atentigas pri la decido de la komitato dum la Pariza kongreso koncerne la propagandon en internaciaj neesperantistaj kongresoj kaj mencias tiurilate la modelan agadon de la Sveda E - Federacio. Do ekaktivu ankaŭ ni aústrianoj sur tiu efik = promesa kampo! Skizo de letero, kiu en multubligita formo estu distribuata al la membroj de la kongresoj en ties oficialaj lingvoj, estas je dispono en la E-Centro.

Esperantista Kulturdomo Kastelo de Grésillon, Baugé

(M.-L.), Francio, okaze de sia inaŭguro kun siaj salutoj direktis al ni la inviton pri vizito. La kastelo de Grésillon estas kooperativa posedaĵo de la E-istoj. Ĝi estas malfermita ne nur al la E-istaro internacia, sed ankaŭ al la neesperantistoj, kiuj dezirus en tre loga kadro, kun modestaj elspezoj, lerni la lingvon dum agrabla libertempo. Bele situanta ., meze de pentrinda regiono, ĝi estas deirpunkto al agrablaj ekskursoj kaj tiuj , kiuj jam vizitis ĝin, tuj entuziasmiĝis. Do, karaj ges-anoj, konsideru la eblecon, pasigi viajn feriojn en la mezo de niaj francaj geamikoj !

==========

1952/53 : jaro de la Esperanto-stelo !

Rimarkigu, ke E s p e r a n t o v i v a s ! Portadu do ĉiam la Esperanto-stelon!

==========

Ekstra poŝtstampilo ĉe la inaŭguro de la Zamenhof-monumento. Kompletige al la raporto en la antaŭa n-ro de AER ni sciigas,ke okaze de la eminenta solenaĵo en Wörgl estis uzata ekstra poŝtstampilo,kiu krom respektiva teksto en germana kaj E-a lingvoj montris ankaŭ la blazonon de la urbo. Tiun atentindan akcelaĵon ni dankas al la ĉefa poŝta instanco en la persono de nia estimata honorprezidanto Sektionschef d-ro Karl D w o r s c h a k .

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

KARINTIO: Hoch-Osterwitz. La 7.9. okazis en tiu ĉi antikva kastelo la 1a karintia-stiria Esperantista renkonto, celinta priparoli la komunajn varbotaskojn kaj la agadon de la loka organiza komitato por la 6a Austria E-Kongreso en Klagenfurt.

SALZBURG: La AKLE-grupo "Estonteco", Salzburg (prez.vikario Josef Kaps , sekr. stud. univ.Heinrich Reiter, Gaisbergstr. 7), eldonis novan, efikan varbilon por Esperanto. Interesatoj akiru ĝin ĉe la sekretario.

VIENO: VIENA E-DELEGITARO : kunvenoj 1.10., 5.11., 3.12. je 18.30 h en la E-Centro ; la grupoj bv. sendi du reprezentantojn ! Aktivaj ges-anoj kiel gastoj estas

ĉiam bonvenaj.

"Harmonio" kunvenas en la nova E-Centro ĉiun vendredon je 19 h; konversacio, prelegoj, biblioteko. Kurso por komencantoj marde, ekde 16.9., je 19 h. Kurso por progresantoj en societejo, 15., Markgraf Rüdigerstr. 4, okazos jaúde, 19 h. Kursisto: s-ano dir. Franz Menacher.

"Nia Vojo". En la grupejo Arbeiterheim Ottakring, Schuhmeierplatz, s-ano H. Schalk gvidas kurson por junsocialistoj.

"Danubio" kunvenas ekde oktobro ree ĉiun 1an kaj 3an dimanĉon (escepte en oktobro nur la 12.10.). Varia programo, 500voluma biblioteko; ges-anoj el la Viena gruparo ankaú rajtas ĝin uzi.

"Kalocsay-Laboro". La grupoj ekde 18.9. denove kunvenas en Volkshochschule Währing, Schopenhauerstr. 49, 19-21 h. Konversacio, ekzercado, literaturo. Granda biblioteko je dispono al ĉiu membro de Viena grupo. Laú peto de s-ano Hugo Kraus, kiu estas ŝarĝita per la redaktado de la AERevuo kaj aliaj E-aferoj, nun nia brava vicprezidanto s-ano Robert Novaček transprenis la gvidadon de la kluboj.

V I E N A E S P E R A N T O - T A G O

okazos la 19an de oktobro

en la restoracio K r a p f e n w a l d l .

Rendevuejo: je la 14a h ĉe finstacio de tramlinio 38, resp. je la 15a h en la restoracio mem.

(Rimarkigo: la kunvenejo devis estis ŝanĝata pro teknikaj kaúzoj.)

V e n u ĉ i u j , precize kaj multnombre!

Aústralia gasto venos al Vieno. Nia s-ano Koppel, loĝanta nun en Aústralio, informis nin, ke s-ano Frank H a l l s , la reprezentanto de la ties E-movado ĉe la UEA-Kongreso en Oslo, deziras viziti nian urbon pro studaj celoj. Li estas preta, prelegi kun projekciataj lumbildoj pri la 5a kontinento. Ni jam direktis al li nian

inviton. Ges-anoj el la liglandoj, dezirantaj profiti lian viziton, skribu sen prokrasto al la E-Centro.

Naturamikaj Esperantistoj, Vieno 15., Diefenbach = gasse 36, komunikas, ke la 21.10, estos komencata ele = menta kurso. Estro sano Finkenzeller informas, ke laŭ instigo de AEF-vicprez. d-ro Grimme la partoprenantoj de vojaĝoj al eksterlando estas atentigataj per speci= alaj leteroj pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj invitataj al la studado de Esperanto.

Ĉu vi jam konas la interesegan gezeton

"EL POPOLA ĈINIO"?

Mendu ĝin en la E-Centro aŭ ĉe la peranto :
A. B a l a g u e, St.Pölten, Kirchenweg 12.
Prezo: 1 n-ro S 2.-, 6 n-roj S 11.- kaj 12 numeroj S 20.-

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE-Vieno/Leteradreso W.Mudrak, Vieno 3.,Beatrixg. 19/5 Nova kurso por komencantoj ekde 14.10., 19 h, ĉiumarde , 1., Graben 13/25 (Kreuzbundheim).Samloke la grupkunvenoj ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato, 17-19.15 h.Gazet = ara servo: Raportis i.a. "Wiener Kirchenblatt" de 24.8. pri la inaŭguro de la Zamenhof-monumento en Wörgl(Schu = bertmesse in E.) 14 liniojn; pri Di-servo en Oslo 5 lin. kaj 31.8. pri AKLE-aranĝoj dum "Katholikentag" 15 lin. "Offenes Wort" de 6.9. pri AKLE-aranĝoj 10 lin.; "Kala= santiner Blätter" VII-VIII/52 pri E-Eŭkaristia Kondkun = veno en Barcelono, 15 lin.; "Die Quelle",Feldkirch, ju = nio 1952 "Esperantistenverband" (ĝustigo de misraporto), 13 lin.;"Klerusblatt", Salzburg, de 26.7."Der Sprachen = mangel" kun pozitiva mencio de Esperanto.

T R A M O N D O

estas v i a v e n d e j o por ĉiuj libroj Esperantaj k a j germanlingvaj !

Vbb

(Zl. 3216/47)

K O R E S P O N D O

DEŜIRAS KORESPONDI KUN NI: Jan PRANGER, Schoorweg 103, Breezand, Nederlando. - En germana kaj E-lingvoj kores = pondemas Stefan N. Boĵkov, Debelec-Tirnovo , Bulgario (junulo 23jara) . - Hans Wanjura, (23) Harpenfeld , Post Bad Essen, Germanio , sendas por 5 bildkartoj 50 diver= sajn poŝtmarkojn . Preferas Vienon . - Valo Derevenec , Okr.obyt.domy, Šaĺa, ČSR-Slovakio , studento, korespon = das kaj interŝanĝas pk., gazetojn, pm., respondo garan = tiata. - Gimnaziano sportema Alfred Kaczmarek , Ostrow Wlkp, Plac J. Stalina 24, Polio , deziras korespondi kaj interŝanĝi pk. - 14jara Jerzy Kubicki interesas sin pri pm kaj bk. Adr.: Mszozonow k. W-wy, Pomatowskiego 18 , Polio. - 21jara ĉeĥa oficisto jaroslav Matula, Jihlava, Sràzná 8, dez. kor. - Kor. dez., interŝ. pm., gazetojn ktp. Gustav Rumánek, Nové Mesto n/Váhom , Ĉehoslovakio. Carl Göransson, Finntorpet 1, Hudiksvall, Svedio, fotoj, pm., kun junaj ges-anoj. - Toshimichi Noda, 1542 , 4 - chôme Shimoochiai Shiujikuku, Tokyo , japanio, pk, pm.- Jaroslav Huda, Vêterný Jenikov, ČSR, let., belarto , ar= kitekturo . - Dinko R. Pavleff , Burgas , Car Samuil 61, Bulgario, bpk , gazetojm fotoj . - Toncho Mavroff , str. Abadgiyska 1, Bourgas , Bulgario,: kor.,bildk.,il. gaz.- Jaroslav Hertrych, Vojice 18 , P. Ujezd Pochhorni , ČSR, intereso pri kor. kaj poŝtm. - H.E. Screaton, 63,Chatham St., Reading, Berks, Anglio , šatas kor. pri muziko kaj fotografarto.

Redakcia noto.

Pri la 38a Univ. Kongreso de E. vi legos detale en n-ro 10/52. - Ni kore petas, ke niaj kontribuantoj bonvolu koncizigi siajn verkaĵojn, adekvate al la eta formato de nia nuna organo.Vi ŝparos al ni multan laboron.

La redakcio.

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur : Hugo Kraus , sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nr.16 Druck: Offset Vervielfältigung,ADRESSEN-SUPPAN,Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-70